

Johann Wolfgang von Goethe,

## Trovita

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Mi tra arbaro  
Sencele iris  
Kaj trovi ion  
Mi ne deziris.

Ĉe l' vojo vidis  
Mi etan floron,  
Kaj ege tuŝis  
Ĝi mian koron.

Kaj kiam volis  
Mi ĝin deŝiri,  
„N rompu min!“, mi  
Ĝin aŭdis diri.

Kaj mi singarde  
Ĝin elterigis,  
Al mia domo  
Ĝin translokigis.

Alialoke  
Ĝi nun kreskadas,  
La eta planto  
Kaj plu floradas.

*Traduko de la Germana poemo "Gefunden" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1982-05-05.*

*MR-010-1 / Arg-376-739 (2006-12-11 22:15:22)*